5na Jaro. Junio -Nr 8 1946

# P A C O kaj J U S T E C O

---

Monata revuo de la grupo B r u g g e

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

---

Prezidanto : Drs F. ROOSE, J.& M. Sabbestraat,12,Brugge.
Sekretariejo : ROOSE-DE KERCHIETER, J. & M.Sabbestraat,12,Brugge.
Propagando : MAERTENS Gr., Nieuwstraat,54, Assebroek.
Poŝtkonto : 291429, Maertens Gr., Assebroek.

---

## De Beteekenis van het Elfde Kongres der Vlaamsche ------ ------ Esperantisten te BRUGGE,met Pinksteren 8-9-10 Juni 1946.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Nauwelijks anderhalf jaar na de bevrijding zet de Vlaamsche Esperantistenbond de vooroorlogsche traditioneele congressen voort. Daarmee alleen reeds is het bewijs geleverd dat het Esperanto stormen kan trotseeren en dat vele machten die een zekeren tijd de plak zwaaien, het hooge woord voeren,nadien maar schijnmachten blijken geweest te zijn.

Inderdaad, datgene vormt een werkelijke macht wat gestadig groeit en wat de menschelijke geest overwint door de vreedzame wapens van de redeneering; niet datgene wat brutaal het lijf in het gareel duwt en waaraan de menschen zich noode eenigen tijd onderwerpen.

Het Esperanto steekt weer het hoofd op.En toch is de tijd niet gunstig.

Na deze zoo juist voorbije wereldoorlog zien wij geen volkerenverzoening tot stand komen zooals na den vorigen wereldbrand. Wij zien geen pacifistische bewegingen opkomen. Van ontwapening is er heelemaal geen spraak. De menschen dragen in zich,onuitgesproken,de overtuiging dat dit alles toch tot niets dient. Evenzoo voor Esperanto moeten velen ongetwijfeld nu de schouders ophalen en zeggen "Esperanto",ach ja, heel mooi, maar het brengt ons niet verder".
En toch blijft het Esperanto nu, evenals vóór den oorlog,een even belangrijke rol vervullen en heeft het een even grootsche taak. Want de techniek gaat vooruit, de naties komen meer en meer in betrekking met mekaar. Volkeren en staten die voorheen niets dan hun onmiddellijke omgeving kenden zien nu voor zich de wereld opengaan. En wanneer alle andere moeilijkheden van de baan geschoven zijn, blijft daar nog het taalbeletsel. En meer en meer nationale talen leest men en zou men moeten kennen. Onmogelijk.
De technische overwinning hier : Esperanto. Een taal die voor allen op de wereld gemakkelijk is om leeren en die geen enkele natie bevoordeeligt noch benadeeligt. En met de intrede van meer en meer naties in de wereldpolitiek,beseft men dat men moet komen tot een organisme dat boven die naties staat en dat hun betrekkingen regelt en hen wetten opdringt, juist zooals het gerecht in ieder land macht heeft over de individuen.
Daarheen gaat het, op een lange pijnlijke weg.
Maar dat gerecht zal de handen zóó vol hebben dat het zal versmoren onder de lasten zoo de volkeren niet zullen geleerd hebben zich te begrijpen,te waardeeren,te beminnen. Statuten kan men steeds anders uitleggen. Wetteksten en gerecht tracht men steeds te ontduiken, alleen de volkerensolidariteit gesteund op de christelijke liefde schept orde en rechtvaardigheid en vrede.

Daarvan zullen de Esperantisten getuigenis afleggen. Wie met de Esperantobeweging in betrekking kwam, weet hoe deze beweging dit ideaal nastreeft, en op welke uitzonderlijke wijze dat ideaal realiteit geworden is in de Esperanto wereld.
Want dit kan men nu nog zeggen : gij zult nooit slagen.
Wij zeggen daarop : dit ideaal is reeds verwezentlijkt, is reeds realiteit geworden in onze mooie aparte Esperantowereld.
En bleef de buitenwereld er doof en blind en stom voor, wij zullen trachten zoovelen als mogelijk is in onzen kring te betrekken en dat is reeds een voldoende reden om koppig voort te werken.

De Esperantobeweging bleef stil gedurende de bezetting, uitgenomen te BRUGGE waar een groep van idealistische jongeren in 't geheim voortwerkte en een maandblad uitgaf. Deze jeugdige groep richt nu het kongres in.

Wij zijn er vast van overtuigd dat het een modelcongres wordt dat, wat het programma betreft, alle vorige zal overtreffen.

Het zal een nieuwe periode inluiden in dewelke wij treden met ons jeugdig enthousiasme en in dewelke wij ons vooral tot jeugdige idealisten zullen wenden.

Drs Fernand ROOSE

Voorzitter v.h. Congrescomité en van de Esperantogroep "PACO KAJ JUSTECO".

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

+ + + + + + + + + +

+ Anna Maria GNIRREP. +

+ + + +

La 9an de Majo 1946 mortis en WEMELDINGE en SUD-BEVELANDO, fraŭlino Anna Maria GNIRREP. Mi ne scias kiom da jaroj ŝi havis; mi pensas ĉirkaŭ 50. Ŝi loĝis en gepatra domo ĉe frato Dro Willem GNIRREP, kuracisto, kiun ŝi helpis sindone kaj kompetente. Ŝi ja eble (mi diras : eble) ne havis ĉiujn teoriajn konojn sed ŝiaj praktikaj konoj pri malsanoj kaj malsanuloj estis tre gravaj.
Mi pensas ke ne multaj raportos pri tiu esperantistino. Ŝia agado restis iom kaŝita. Ŝi ne publikiĝis. Ŝi havis humilan rolon, tamen tre grandan.
En la bela domo ŝi aranĝis multajn loĝoĉambrojn kaj ofte ĉiuj estis plenaj. Multaj gesamideanoj vizitis ŝin kaj ĝuis ŝian gastamon.
Inter ili kelkaj tre bone konatoj. Ŝi havis veran intereson (ne pedantan) por nia literaturo kaj movado kiun ŝi tre multe subtenis. Ankaŭ al mi kaj al miaj fratinoj la favoro estis donata ekkoni ŝin. La vizitoj de ŝi al mi kaj de mi al ŝi restos inter la plej belaj momentoj en mia vivo. Oni tuj sentis ke oni staris en kompanio de tre granda animo. Ŝi estis tiel bona, tiel ĝentila, ke mi tuj vidis en ŝi la bonkorecon kaj la moralan altstaron de nia majstro mem. El tiaj personoj radias ĉiam ega ĉarmo. De post tiu momento ŝi restis stari antaŭ miaj okuloj kaj nun finfine ŝi scias kiom ofte mi pensis pri ŝi dum la longaj jaroj kiuj nin tenis for unu de la alia kaj kiuj ne permesis al mi ankoraŭ revidi ŝin en tiu-ĉi vivo. Sed mi povus citi la vortojn de Charles Beaudelaire " Ton souvenir en moi luit comme un ostensoir". La rememoro pri ŝi lumas en mi kiel monstranco ĉar mi amis ŝin kiel fratinon.

Drs Fernand ROOSE.

- - -

La plej alta scienco estas : fari dum vivo tion kion ni deziras esti farinta je mortelveno.

# U N U E C O

(Kiel nova, juna esperantisto, mi observis la esperantajn organisajn talentojn)

En la februara eldono de nia T.J.O.Organizo aperis artikolo, titolita " Pri nia Organizo". La verkisto estis Sano Eloo Meydam. Nia sekretario priparolis la konkludojn de la Belga T.J.O. sekcio dum perantkunveno en Brugge.

La ĉefperanto raportis fakte nur la konkludojn, sed mi volas klarigi la motivojn ?? Ĉefe pri la aliĝo al I.E.L.

Resumante la artikolon, mi elprenas tiujn frazojn de la T.J.O.-sekretario :

"Ĉu niaj katolikaj membroj ne preferc aliĝos poste al la katolika ligo, ol al I.E.L., kaj ĉu ne same la anoj de aliaj religio aŭ konvinkoj aliĝos prefere al sia samideana ligo ? Se ni aliĝas al I.E.L., tio signifas ke niaj membroj je plenaĝiĝo devus transiri al ĝi ? Ĉu ili dezirus tion ?

Oni diros : ankaŭ en IEL estas loko por ĉiu. Jes efektive, sed dum SAT, IKUE ktp. ekzistas, kaj laŭ mi tio ne estas bedaurinda; male. Politika, religia konvinko okupas la tutan homon. Tial la religianoj plej bone povas labori kiel religiaj esperantistoj ; tial politika esperantisto ĉerpas sian forton el sia politika konvinko. Domaĝa la ekzisto de la diferencaj internaciaj organizoj nur fariĝas, se la diversaj ne trovas unu la alian sur la tereno de komuna intereso. "

Mi certe konsentas je la lasta punkto. Sed la granda eraro kontraŭ la esperantista mondorganizo, kaj la barilo kontraŭ la tiel dezirata UNUECO ne estas la eksistado de T.J.O., IKUE , IEL, SAT, sed la nealiĝado de tiuj mondorganizoj al IEL, konsiderante nur la esperantoparton de tiuj organizoj.

Se ni ekzamenas ilian celon, oni vidas ke ĝi estas duflanka. Unue, politika, religia aŭ ideala ideo, kiu devas iĝi pli forta aŭ pli konata pere de esperanto, kaj, due, en propra rondo, disvastigi esperanton.

Por fiksi la ideojn, ni konsideras ekzemple la agadmanieron de IKUE en tiuj du punktoj.

Kiel katolika movado, ĝi estas parto, sekcio de la eklezio. Iliaj planoj kaj teorioj estas la samaj. Kaj la celo konsistas el la volo disvastigi la katolikajn ideojn. Por organizi kongresojn aŭ por helpi per mono iun mision, la eklezio, se ĝi demandus, povus ĉiam kalkuli je la kunlaboro de IKUE. Ĉion IKUE faras pere de esperanto. Nia lingvo estas perilo. Bonege.

Sed nun la dua celo de katolika mondorganizo : disvastigi esperanton, pere de la katolikismo. (en la Katolika mondo). Kiu estas nun la ĉeforganizo de esperanto ? IKUE ? Tute ne, ĉar esperanto ne nur estas parolata de katolikoj. La katolika esperantistaro fakte nur estas parto de la granda esperanto-familio. Ĝi nur estas fak-organizo.... Ĉu ekzistas centro por la esperanta mondmovado ? Jes, IEL.

Ni nun havas egalecon :

1. La eklezio estas la centro de IKUE, konsiderante nur la katolikan agadon. (faritan pere de esperanto.)
2. I.E.L. estus la centro de IKUE, konsiderante nur la esperanto-agadon. ( Faritan pere de la katolikismo.)

Kiel, la dua punkto ne ankoraŭ efektiviĝis ?

La saman teorion ni uzus por TJO, SAT, DELI, ekz. la tutmonda Junularmovado.

../..

La unua punkto forfalas,ĉar ne ankoraŭ ekzistas centro por la neŭtrala junularmovado. TJO estas do mem la centro.(kaj se esti logika, ĉiuj religiaj,politikaj junularasocioj,devus aliĝi al TJO., kiel asocia grupo). Sed la dua punkto restas. Se tiu vidpunkto efektiviĝus, ĉiu TJO-ano estus membro de IEL, kaj poste, transirante ekz. al SAT, ili restus membrojde I.E.L.

Kaj iĝas neceso ke ĝi efektiviĝu. Lu fondas eble mondligon de la blindaj esperantistoj. Kial ili aliĝos al IEL, se IKUE, STA, ktp. ne faras. Do ...... Unueco ? Ĉu vi jam aŭdis pri EMO. . Unueco ?

Esperanto venkos ? Unueco ! kaj poste la venko. IEL sendas petskribojn je propra prirespondeco. Ho ve, IEL forgesis demandi al aliaj mondorganizoj..... Ho ve, IEL eraris, eble IEL pensas ke ni (la aliaj mondorganizoj) estas tro malfortaj., kaj ke IEL povus agi sen nia kunlaborado. IEL, certe eraris, sed kial ? UNUECO.

Mi scias ke veteranoj de la movado ekridos, legante la teorion . Ili jam konas la batalon senesperan. Ili jam diris ke unueco estas utopio.
Sed ni estas junaj, ni estas novaj esperantistoj. Ni volas ankaŭ ke Esperanto venku. Kaj tial ni ne akceptas argumentojn kontraŭ nia opinio; nur, ankoraŭ pli bonan proponon por ebligi la Unuecon.

Kaj mi scias ke multaj,junaj TJO-anoj, IKUE-anoj,SAT-anoj,havas la saman opinion.

La posteuloj mokridos je la nuntempa homaro,kiu preskaŭ ne volas akcepti internacian helplingvon,sed konsiderante la organizajn talentojn de la batalantaj esperantistoj,ili certe ekridegos.

Ne eblas por mi efektivigi la planon ĉi-supre menciita : La prirespondecon havs IKUE, STA, TJO kaj la aliaj mondorganizoj.

Ĉu vi pensas ke IEL iĝus diktatora se ĝi estus la sola internacia centro ? Tute ne, ĉar estus la membraro,per kiu ĝi iĝus forta, kaj tiu membraro estus parto , kiel ĉiam, de TJO, IKUE,SAT, ktp.

IEL volas ke esperanto venkas.

Ĉu ekzistas esperantisto kiu tion ne volas ?

Mi estas ĉiam preta klarigi ankoraŭ pli tiun vidpunkton,se mi helpus al la unuecigo de Esperanto-Mondmovado .

Maertens Gr.
Nieuwstraat,54,
Assebroek-BRUGGE
BELGUJO

TJO-ano
Membro de la grupo Paco kaj Justeco, Sekcio Brugge de Flandra Ligo Esperantista.
M. A. de IEL.
Membro de IKUE
Membro de I.A.P.K.

Du amoj faris du urbojn : la amo al si ĝis la malestimo al Dio, la monda urbo ; la amo al Dio ĝis la malestimo al si, la ĉiela urbo.

(Sta Aŭgusteno
"De civitate Dei"
libro XI ĉap. 28 ).

La mensogo estas la armilo de la malfortuloj

- - - - -

Ni ĉiam pravas kaj la sorto ĉiam malpravas

# La Flandraj Havenoj





fig. 1





fig. 2

x x x x x x x x LA FLANDRAJ HAVENOJ. x x x x x x x x

x x x x x x x x x x x

Antaùrimarko : En tiu-ĉi artikolserio ni volas doni nur kelkajn historiajn kaj aktualajn notojn pri la kvar ĉefaj havenojnen Belgujo : OOSTENDE, BRUGGE, GENT kaj ANTWERPEN.

## OOSTENDE

### A. Historio

La Flandra marbordo ne ĉiam lokiĝis kie ĝi estas nun.
En la 5a jarcento la marakvonivelo plialtiĝis tiel ke la akvo envadis la kontinenton ĝis distanco de proksimume 12 Km. ,do ĝis linio ± paralela ol la nuna marbordo,kaj atinganta BRUGGE. (Vidu fig. 1)

La tuta teritorio iam sub la akvo estas nun la tre fruktedonaj Polderoj. Tri restaĵoj de tiu marosuperfluo estas hodiaù:la restaĵo de la iama Sùinriverego, Norde de Knokke Zoute, la Izerrivero al la maro apud Nieùpoort kaj la endigita "Moeren" ( Marĉoj) sur la landlimo de Flandrujo en la belga Ŝtato kaj Flandrujo en la Franca Ŝtato.
Post la 5a jarcento la akvo tre malrapide retiriĝis. Pli kaj pli da insuletoj ekestis kiujn la monaĥoj endigigis.
Je iu momento - verŝajne en la 9a jarcento - nia marbordo montris aspekton kion ni montras sur fig. 2.

Sur la plej orienta parto de tiu insulo,kelkaj fiŝkaptistoj de Mariakerke konstruas la havenon. OOSTENDE (la nomo signifas "Orienta finaĵo "). Kaj tiel oni kapablas kompreni la nomon. Se vi rigardas sur land karto kaj rimarkas la situon de vilaĝoj Middelkerke (=preĝejo en la mezo) de Oostende kaj de Westende (= okcidenta finaĵo )

Meze de aliaj vilaĝoj sur sama linio, tiam tiuj nomoj estas certe strangaj kaj nekompreneblaj al vi. Sed rigardante fig. 2 vi certe komprenos kial la tiaaj enloĝantoj donis ĉiajn nomojn.
Bela nombro de dokumentoj estas konservitaj el tiu 9a jarcento.
Ili montras ke la insulo estas jam loĝita por permesi ŝafpaŝtistadonkaj ĉiufoje oni legas la jenajn nomojn:Oostende Tesserep, aŭ Oostende Testerep aŭ Westende Terstreep (=sur la terstrio).

La nova haveno restis taŭga ĝis la duono de la dekdua jarcento. Tiam la sablo tro plenigas la markolon (ĉar ja la maro konstante kaj daŭre retiriĝis). Grafo Filipo de Elzaco, la granda konstruanto, konstruigas novan havenon : ZANDHOVE (=sabloĝardeno),la nuna Nieuwpoort (=nova haveno).

Je la fino de la 13a jarcento la akvokolo al Oostende estas komplete fermita kaj jam formiĝas tre mallarĝa dunaro. Dum la tuta 14a jarcento la Oostendanoj planas fosi novan havenon.

1394 kaj 1404 du egaj akvosuperfluoj detruas grandparte la dunojn kaj la urbon. Finfine en 1445 duko Filipo de Burgundio donas rajton konstrui novan havenon flanke de la malnova urbo.
Tiu haveno situis okcidente de la urbo kaj la ĉirkaŭaj domoj kaj stratoj estis laŭ plano konstruataj kaj ne hazarde, unu post la alia kiel okazis pli frue. Nun venas la unua prosperega periodo de Oostende.
Je la fino de la 16a jarcento, tiu terura epoko de la religimilitoj sub hispana regado, Oostende estis sieĝata kaj grandparte detruata. La dunoj norde de la urbo estis traborataj kaj la urbo estis denove insulo. Post konkero de Oostende ni decidas tuj fari novan havenon ne sur la antaŭa loko,sed nord-okcidente,do tie kie estis la unua haveno, kaj tie kie ĝi estas hodiaŭ.

Dum la 18a jarcento Oostende estas iĝonta tre fama kaj tre grava per la Oostenda kompanio por la komerco kun la malproksima oriento. Sed, malfeliĉe tiu komerca kompanio nur daŭris dum 5 jaroj!
Ĉirkaŭ 1780 la Aŭstria imperiestro Jozef IIa (de post 1713 nia lando apartenis al Aŭstrujo) deklaras Oostendon "libera haveno" kaj tre multaj ŝipoj de la militantaj landoj vizitas ĝin tiel ke la haveno disvastiĝas ĝis la terpeco nun nomata "hazekwartier" (=leporokvartalo). Multegaj fremdlandanoj tiam loĝis en Oostende.
Do antaŭ la deknaŭa jarcento la disvastiĝo de la urbo okazis laŭlonge de la kanalo al BRUGGE, sed depost tiam ĝi okazas laŭlonge de la marbordo kaŭze de la intensiĝo de la turismo. Efektive Oostende iĝis la "reĝino de la banlokoj".

2. Nuna rolo.

Ni donas ciferojn de enven~~a~~antaj marŝipoj en 1938
Belgaj : 345; Danaj : 18 ; Germanaj : 11; Anglaj : 229 ; Estonaj 18; Finnaj 9 ; Francaj 18 ; Grekaj 7 ; Italaj 5 ; Lettaj 9 ; Litova 1 ; Nederlandaj 95 ; Norvegaj 27 ; Polaj 4 ; Portugalaj 2 ; Joegoslavaj 3 ; Svedaj 29 . La sumo de la tunmezuro estis 496.167 tunoj.
La antaŭan jaron envenis ankaŭ : Islanda 1 ; Rusa 2 ; Hispana 4 .
Dum la sama jaro 1938 envenis ankaŭ 1062 ŝipoj de interna navigado.
Tre grava estas Oostende por la trafiko de la pasaĝeroj.
Jen statistiko por la sama jaro 1938 .

| Monato | Nombro de ŝipoj | envenintaj vojaĝantoj | forinintaj vojaĝantoj | sumo |
|---|---|---|---|---|
| Jan. | 62 | 8.583 | 13.627 | 22.210 |
| Febr. | 56 | 6.275 | 7.270 | 13.545 |
| Marto | 64 | 7.258 | 8.036 | 15.295 |
| Aprilo | 77 | 27.842 | 25.359 | 53.201 |
| Majo | 75 | 16.519 | 15.692 | 32.211 |
| Junio | 129 | 41.901 | 32.762 | 74.663 |
| Julio | 183 | 89.515 | 63.310 | 152.825 |
| Aŭg. | 182 | 78.158 | 95.737 | 173.895 |
| Sept. | 127 | 27.367 | 46.671 | 74.038 |
| Okt. | 63 | 6.828 | 7.608 | 14.436 |
| Nov. | 62 | 4.876 | 6.024 | 10.900 |
| Dec. | 64 | 10.717 | 6.710 | 17.427 |

..//..

Rimarkoj :Evidentas ke la enveno kreskas ege dum la tiel nomataj bansezonoj kaj la libertempoj de Kristnasko kaj Pasko. Oni ne miru pri la granda nombro da forvojaĝoj dum Aŭgusto. Ĉiu al la marbordo scias ke oni konsideras la 15an de Aŭgusto kiel la finon de la bansezono.
Oostende estas ankaŭ grava fiŝisthaveno. Je la fino de 1935 la fiŝistŝiparo konsistis el 20 vaporŝipoj, 250 motorŝipoj kaj 20 malfermitaj boatoj kun aŭ sen motoro.

La produkto de fiŝo en 1931 14 miljonoj de Kg atingis 20 miljonojn en 1935. En 1935 la Oostendaj boatoj en la daŭro de 8 semajnoj alportis 12 miljonojn de Kg. da haringoj. La plej granda parto estas eksportata.

(daŭrigota)

Drs Fernand ROOSE.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

## °°°°°° IC PRI KAFO. °°°°°°

Nun ke la milito estas for en nia lando, kaj ke oni denove povas ĝui la bonan kafon,oni certe ne devas demandi kiu ŝatas trinki tason da aroma kafo ! Malmultaj donus negativan respondon. Sed multaj trinkantoj ne scias ion pri la origino de tiu trinkaĵo.

Ĉe la plej granda parto de la civilizitaj popoloj,kafo iĝis preferita. La Belgoj ŝatas trinki la kafon dum la manĝoj. La Nederlandanoj kontraŭe ne ŝatus malhavi ilian tason da kafo antaŭ la tagmezo kaj ili tre malofte trinkas kafon post la tagmezmanĝo.
La Germanoj preskaŭ ĉiam preparas malfortan kafon sed en niaj regionoj, oni ne ŝatas tion.

La Araboj en Abinesujo verŝajne estis la unuaj kiuj prizorgis la kafo-planton. La kafo de Arabujo estas la plej bona, la plej aroma kaj elektita trinkaĵo de la geamatoroj.

Antaŭ la XVIIa jarcento, oni ne konis la kafon en Eŭropo. Ĉirkaŭ 1650 oni uzis la kafon kiel trinkaĵon, kune kun teo kaj ĉokolado. Dum tiu jaro, la Judo Jacobs, malfermis la unuan kafejon en Oxford, kaj post du jaroj oni sekvis tiun ekzemplon en Londono. En 1660, Louis XIV ricevis kiel donacon,paketon da kafo kaj tiamaniere la kafo estis konata en Parizo.

Iomete poste, Armeno, vendis tasojn da kafo en tendo dum la foirtagoj en St Germain. Estis la unua kafejo en Francujo.

En 1720, famkonata plantejposedanto deziris fari eksperimenton. Li sendis kelkajn kafo-plantojn al la insulo St Martinique,kaj por tio li donis tri etajn arbetojn,plantitajn en potoj,al la ŝipestro.

Bedaŭrinde dum la transiro okazis granda manko de trinkakvo kaj du plantoj pereis kaj nur unu restis. La pasaĝeroj mem ricevis tiel malmulte da akvo ke ili ne volis cedi guton de akvo por la restinta planto.
La ŝipestro tamen donis belegan ekzemplon kaj ĉiun vesperon li surŝprucis la planton per sia malgranda porcio da akvo kaj tiamaniere li kunportis la planton,bonkonservita al la Antilo (Okcidenta Hindujo).

Nun io pri la kafo mem : la matura frukto de la kafo-planto similas je ruĝaj beroj kiuj entenas du grajnojn. Post la ŝirkolektado oni senŝeligas la fruktojn,helpe de muelilo kaj purigas ilin poste sekigitajn en la suno. La grajnoj devas esti rostitaj en fermita turninta cilindro.

Tiel la kafo estas preta por la komerco.

Germaine Mallet.

°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°

La fundamentaj principoj de homo estas tiuj kiujn li forgesas klarigi

(G.K.Chesterton).